

© 大正二年一月十七日第三種郵便物認可

Oriente Azio

III^a Jaro No 1 (25). 15^a Novembro - 1913.

Redaktejo
Sekaigo-ŝoin,
Oosakimači,
Ebaragun
Tokio.



Orienta Azio

havas en ĉiu numero du aldonojn « memlernantoj » de japanalingvo kaj tiu de Ĥina, kaj kies nur unu ni sendas al jarabonantoj laŭ elekto. La aldonoj de la unua kaj dua jaroj kostas entute po 0.14 sm.

Jarabona: 1.400 sm., unu aparta numero: 0.120 sm., pro numero korespond kupono (Oni ne akceptas poŝtmarkojn, krom japanajn).

ENHAVO — Nia Idealo — Japanidoj en Meksiklando — En la vojo de Militaro — Anka de Limejde — La Terura nokto — Kroniko, En Formosa, Tokio Esperanta Societo, Jokoska Esperantista Societo k.t.p. — Korespondo — Anonco, 交換廣告 Fakoj de korespondo — Bibliografio — Aldonoj, memlernantoj de japana kaj Ĥina lingvoj.

Pri la desegnaĵo sur la kovrilo. Antikvaj Saĝuloj Orientaj diris, ke « Koo » estas la fundamento de ĉiuj homaj virtoj, kaj tiu « Koo » estas devo de la gefiloj kontraŭ siaj gepatroj.

El tiu principo ili ankoraŭ diris, ke « Oni faru al la mortintoj, kiel faras al la vivantoj ».

Tiu dogmo nun ankoraŭ estas zorganta en nia, kaj la desegnaĵo sur la kovrilo montras Koreon, kiu estas ĵus oferanta oferaĵojn al lia familia tombo.

— 3 —

Tenugui,

Japana kapotuko

estas nur kotonŝtofo de 3.3×8 decimetroj, kaj ĝi havas diversaj-kuriozajn bildojn — kolorigitajn, tiel estas uzata al aŭ ornamaĵo aŭ dormaĵo, kaj nun Amerikanoj ĝin uzas al tablotuko, kunkudrinte duon de ĝi.

Unu el la plej bonaj « Tenugui », tiuj nun mi verdas havas belegan bildon, kiel jena.

1 de tiuj belegaj « Tenugui » estas 24 sd., 10 2.00 sm., 10 kun diversaj diferencaj bildoj, bestoj, birdoj, popoloj kaj pejzaĝoj k.t.p. estas 2.20 sm.

Mendantoj
sin turnu
al la Red.
O. A.

 Nakajas-
vendisto.

La belulino
de Genrok-epoko.



Hakata-pupo japana ornamaĵo.

La Hakata-ningio aŭ teraj pupoj estas
la plej taŭgaj ornamaĵoj en salono.

Diversspecaj figuroj reprezentantaj
japanajn morojn, kiel ekz. viroj,
virinoj, junuloj, maljunuloj, vilaĝ-
anoj, militistoj, pastroj, belulinoj k.t.p.
ambaŭ antikvaj kaj nunaj —



Hakata-ningio,
kia infano estas
leganta libron.

35 sd. la
prezo.

10 de div-
ersaj figuroj estas 3.00 sm.

Mendantoj sin turnu de la Red. O. A.

Sekaigo-Ŝoin, Ebaragun, Tokio.

Vendisto-Kobajaŝi-ja.

東焼床置物。博多人形美術焼

Orientaj Moneroj

Nun ni havas du grandajn monerojn an-
tikvajn, kiujn ni povas malkare vendi
al kolektantoj.

Unu en tiuj estas nomata « Tenpoos-
sen » alia « Ĵoohei-cukou ».

Tenpoosen.

Ĵoohei-
cukou.




La « Tenpoosen » estas farita 18
45 jare en japanoj, kaj la « Ĵoo-
hei-cukou » antaŭ preskaŭ 100 jaroj
en Koreoj, kaj ambaŭ ne estas facile
akiri.

1 de Tenpoŝen estas sm 0.20,
Ĵoohei-cukou sm. 0.30.

Aĉetantoj skribu al la Red. de O. A.

Vendisto Taki-jamo K.

Karaj filatelistoj!



De la 31^a de Oktobro ni havas novajn poŝtmarkojn, kiuj estas iom pli belaj.

Se oni sendos al ni 2 respondkuponojn ni sendos al vi 20 diversajn japanajn poŝtmarkojn kun la novaj.

Se 3 respondkuponojn sendos al ni, ni sendos 5 belegajn ilu. kartojn el Tokio, kaj sur la koverto estas gluataj 5 rin, 1 sen, 1.5 rin, 2 sen, 3 sen, du de 4 sen el la novaj belaj markoj.

plie diversaj memoraj markoj estas aĉeteblaj ĉe ni.

Mendantoj sin turnu al la Red. de Orienta Azio. ĉe Sekaigo-Ŝoin, Ebaragun, Tokio, JAPANUJO.

Vendisto Taki-jama.

Ni ne ricevas pli multan transpagilon ol 1 jen.

Orienta Azio

Ĉiu monata internacia gazeto

III^a jaro No 1 (25) Novembro 1913.

NIA IDEALO.

En primitiva epoko de la homaro, homoj bataladis unu kontraŭ alia, kiel individuo aŭ kiel familio.

Poste, ili militadis pro sia vilaĝo, urbo, gento, nacio aŭ religio longtempe kiel historio rakontas al ni.

En nuna tempo estas kontraŭstarantaj sin reciproke kerkaj da potencaj regnoj, t. e. Anglujo, Francujo, Germanujo, Rusujo k. t. p., ĉiu el kiuj regas larĝan teritorion enhavantan multege da popoloj de diversaj gentoj aŭ nacioj sub fortika regeco.

Pli kaj pli grande evoluciadas la skalo de militado kaj samtempe la unuo de konkurado ankaŭ.

Efektive, mia avo servadis fidele pro sia feŭdo kaj batalis kontraŭ aliaj feŭdanoj (ĝis antaŭ 50 jaroj en japanujo sin trovis pli ol 300 da feŭdoj, kiuj ĉiuj respektive havis siajn registrojn nomitajn «Daimio»).

Mia patro, amikiĝinte kiel samlandulojn kun la aliaj feŭdanoj, kontraŭ kiuj lia patro severe batalis, militis pro la patrujo kontraŭ Kore-

ujo kaj Ĥinujo.

Plie pri mi mem, edziĝante kun la filino de alia feŭdulo, kiu estis unu el la malamikoj de mia avo, nun sin trovas kiu samregatoj kun koreanoj, kiuj estis iam la malamikoj de mia patro.

Kiuj estos do la malamikoj de miaj filoj, de miaj nepoj kaj fine de miaj pranepoj?

Konsiderante tiajn faktojn, ni ne povas ne atingi al la konkludo, ke post efektiviĝo de la principo de la homara unuigo, fine alvenos al ni tiaj tagoj, kiaj ĉiuj homaroj tra la mondo fariĝos sinceraj amikaroj!

En tiu ideala epoko, «Esperanto» fariĝos sole la plej necesega komunikilo por la tuta homaro.

Cetere, la propagandado de la utila lingvo «Esperanto» estas unu el la plej povplenaj penadoj por realigi tiun idealon.

Otto Muto.

Naraken (japanujo)



JAPANIDOJ EN MEKSIKLANDO

Kiuj esploris japanan historion, tiuj eble scias, ke, en feŭdala epoko, havis intencan submeti landojn «Nanban»¹⁾ Date Masamune, daimjo²⁾ de la distrikto Sendai, sendis sian serviston Hasekura Rokuemon Cunenaga al Romo Italujo, por certigi cirkonstancojn de la landoj.

La 15^a de Septembro 1613, kun sekreta ordono, R.C. Hasekura forlasis havenon «Cukiŝio-ura» en regiono Mucu al Romo. Tiam lin sekvis sesdekdek da liaj servistoj kaj dek maristoj.

La 25^a de januaro 1614, ili alvenis havenon «Akaparko» en Meksiklando, de tie, post ses monatoj da restado, ili iris en Romon tra Hispanujo.

Kiam ili alvenis la havenon «Akaparko», R.C. Hasekura pensis, ke la sekvantoj estas tro multaj, tial, okaze de reŝarveturo, ĉirkaŭ dudek el la sekvantoj li postlasis en tie.

Rim. 1) en feŭdala epoko japanoj nomis Hispanujon, Portugalujon, Germanujon kaj aliajn Eŭropajn landojn «Nanban» 2) Daimjo signifas «feŭdala sinjoro».

Ne povinte reveni sian patrujon, la rondo de la postlasitoj fariĝis tero de la fremdlando. Sed tamen iuj el ili fariĝis tiej oficistoj, iuj okupis sin en industrioj; aliflanke, ili edziĝis kun la enlandulinoj kaj naskadis multe da siaj idoj.

Oni diras, ke Porfirio Diaz, la lasta prezidanto de Meksiklando, kaj lia nevo generalo Filix Diaz estas japanidoj, ĉar patrino de Porfirio Diaz estas idino de japano, nomita Suehiro, kiu estis unu el la sekvintoj de R. C. Hasekura, ke en "Akaparko" kaj aliaj urboj, vilaĝoj kuŝantaj laŭborde de la pacifika oceano troviĝas multenombro japanidoj, kiuj ricevas familiajn nomojn "Suehiro", "Maki", "Isida" K. T. P. Kiujn oni povas tiel ankaŭ trovi ĉe urbo Sendai kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, kaj ke ankaŭ troviĝas kelke da japanidoj eĉ inter supra-parlamentanoj.

En "Akaparko" kuzas Konata templo, en kiu, oni diras, foje restadis la rondo de japanoj, kaj en kiu ankoraŭ hodiaŭ estas posedataj la armiloj — metalavestoj, kaskoj, lancoj, glavoj kaj sabroj — kaj aliaj diversaj iloj, kiujn japanoj alportis, kiel ŝatindan trezoron.

Antaŭ ĉio tieaj urbanoj estas tute

fieraj pri tiuj posedaĵoj.

Kaj vizitantoj el aliaj urboj aŭ el fremdlandoj nepre vizitas la templon por vidi tiun ŝatindan trezoron.

Krom tio, en "Akaparko" oni trovas sandalojn tute similajn al tiuj de japanujo, kaj ili estas nomataj "Uarazi" laŭ japana nomo, kvankam ili ne estas faritaj el pajloj.

Cetere, oni trovas mantelojn kontraŭ pluvo kaj larĝbordajn ĉapelojn faritajn preskaŭ konforme al "Mino"¹⁾ kaj "Sugagaza"²⁾ kiujn japanaj terkulturistoj uzas en siaj laboradoj, kvankam iliaj nomoj estas malsimilaj al tiuj en japanujo.

Laŭ historio de primitiva epoko de Meksiklando kaj tradicio, prapatroj de la landanoj sendube estis gentoj enmigrintaj el Tartarujo-Azio.

Estas nediskutebla fakto, ke Meksiklandanoj havas grandan malsimilecon kompare kun ĝeneralaj enlandanoj en suda aŭ norda Ameriklando kaj, ke ilia fizionomio kaj koloro de haŭto estas tute similaj al tiuj de japanoj.

Kompreneble, la enlandanoj en Meksiklando apartenas al gento Azia.

Rim. 1) mantelo kontraŭ pluvo, farita el pajloj. 2) ĉapelo larĝborda, farita el karikoj. Turnu ĉi tiu paĝon v. v. dos ilin en la desegnaĵo.



Terkulturisto.

(Laŭ rakonto de
S-ro K. Horiguči kiu
estis japana ansta-
taŭambasadoro al
Meksiklando)

Verdulo (Tokio)

EN LA VOJO DE MILITIRO

霜滿軍營秋氣清
數行過雁月三更
越山併得能列景
遶莫家鄉憶遠征

Dormas silentaj en frost' la Tendaroj,
Estas freŝiga l'aŭtuna aero;
Flugas jen super ni for anseraroj,
Staras la luno meznokta fiere.

Nun mi kun Eĝo-Montaro la bela
Bordon pentridan de Noto admiras,
Tamen, la bona edzino fidela —
Ho! al mi ĉi en la hejmo sopiras!

Tradukis K. Ossaka el Ĥinlingva
poemo de Uesugi, dajniu (nobelo feŭ-

dala en malnova tempo de Japanujo).

ANKA DE LIMEJDE

(Daŭrigo)

Ĉar estis sendita multego da mal-
benoj sur la maljunulon ĉe Telamar-
ĉo; ili venis kaj sin sidigis nur
sur la litrandon, kiam li tie kuŝis
senforte, porante nur krii, kriegi
tiel, ke oni tion dum la noktoj de
malproksime aŭdis.

Ricŭlido li estis en sia juneco,
kaj por ankoraŭ pliriĉiĝi li tromp-
is la malriĉan knabinon, kiu lian
infanon sub sia koro portis.

Unu sian flinon li ĉasis en la mor-
ton, ĉar ŝi sindonis al la servisto,
alian li devigis eniri geedzecon, kiu
estis al ŝi nur infero. Oni preparol-
is ankaŭ multon alian multe pli mal-
bonan aferojn tiam terurajn, ke neniu
kuraĝis ilin preparoli laŭte.

Sed li mem ilin tamen memoris, li,
kiu tie kuŝadis kaj suferadis.

En tiu tempo, kiam la malsano lin
kaptis, oni alportis kuraciston de l'
urbo.

Li nenion povis fa-
ri; li ŝmiris per ŝmiraĵoj kaj donis
kuracilojn, skuanter la kapon, pens-
ante ke estis pli l'animo ol la korpo,
kiu suferegis.

Tiam ili alvenigis la pastron; estis

eĉ la maljuna ĉefpastro. Tuj, lin ekvidinte, la malsanulo furioziĝis, kaj ŝajnis minaci la vivon: li kriis, petante la ĉefpastron vojaĝi malbonan lokon.

La maljuna ĉefpastro ne estis timema, sed nun li teniris, « Ni devas atendi, ĝis kiam lia animo pli trankviligos, » li diris.

Kaj estis tempo por atendi.

Jaron post jaro la maljunulo tiel kuŝadis, sed lia animo ne plikvietiĝis.

Anka estis alvenigita. La malsanulo ĝin lasis fariĝi. Ŝi sidis ĉe lia lito kaj murmuris kaj jonglis kaj mezris, legis super brando kaj faris signojn kaj alpreĝojn. Kiam ŝi

fuivinte, estis transdononta la glason da brando al li, li komencis ridi.

Li ridaĉis tiom malafable, ke al ĉiuj aŭ ĝin aŭdantaj ĝi ŝajnis pli malbona ol liaj plej koleraĵoj kriegoj.

Sed Anka ne kapablis tion plu vidi:

Ŝi auskultis iom da tempo ĉi tiun ridadon, tiam ŝi ekĵetis la glason da brando ĝuste en lian vizaĝon kaj fleksinte sin super lin diris: « Al Diablo vi apartenas, kaj li certe vin ricevos, kiam lia tempo venos. »

Sed ankoraŭ li ne kuraĝas preni vin, — estas sufiĉe da diabletoj tie, kie li estas! Sed vi tamen estos turmentegata ĉi tie kaj longtempe kaj taŭge antaŭ ol mi remetos min an piedon tien ĉi! »

LA TERURA NOKTO

rakonto de A. Ĉeĥov, el Rusa lingvo

Traduk. N. Siromiatnikov

Jvan Petroviĉ Parihidin ekpaligis, plimalgrandigis la lumon de la lampo kaj komencis je maltrankvila voĉo lian rakonton:

— Nigra senluma nebulo pondiĝis super la tero, kiam mi riokte sub Kristnasko^{*)} de 1883 jaro revenadis Leimen de, mortinta nun mia amiko, kie ni ĉiuj okupadis je spiritika seanco.

La stratoj, tra kiuj mi iris estis mal-lumaj kaj mi devis vagadi, kiel blinda.

Mi loĝis tiam en Moskvo en la domo de oficisto « Trupov » Leque, en unu de la plej malproksimaj lokoj de l' Arbat^{**)}.

Miaj pensoj, kiam mi iris, estis tre malĝojaj, premiitaj.....

« Via vivo proksimiĝis al fino..... pentu..... » Tio ĉi estis la frazo, dirita al mi en seanco per « Spinoso », kies spiriton ni elvokis.

Mi petis kaj spirito de « Spinoso » ripetis kaj aldonis « Hodiaŭ nokte ».

Mi ne kredas spiritismon, sed la penso pri la morto ĉiam premas mian koron.

La morto, de sinjoroj, estas neevitebla, ĝi estas ordinara, sed tamen la penso pri ĝi estas kontraŭa je naturo

de l' homo. Nun do, kiam min ĉir-
kaŭis nepenetrebla, malvarma mallumo
kaj antaŭ miaj okuloj furioze, senĉese fal-
adis la gutoj de pluvo kaj super mia ka-
po ĝemis vento, kiam ĉirkaŭe mi ne vid-
is ian vivan animon kaj ne aŭdis ian
Loman voĉon mia animo ekplemiĝis de
la nekomprennebla teruro.

Mi — homo grandaĝa, sufiĉe klera, rap-
idis, timante sin returni malantaŭen,
ekrigardi ĉirkaŭe. Saniis al mi, ke
se mi ekrigardos malantaŭen, mi nepre
ekvidos la morton en formo de fantomo.

Panafidin rapide ekspiris, ektrinkis ak-
von kaj daŭrigis: — Tiu ĉi kompren-
ebla al vi teruro ne lasis min kaj tiam,
kiam mi sin levinte sur kvara etaĝo
de l' domo de "Trupov", malfermis la
pordon, kaj eniris mian ĉambron.

En mia modesta loĝejo estis mal-
lume. En la forno ĝemis kaj
ploris la vento, kaj kvazaŭ penante
trapenetri internen, frapadis fenestron.

«Se» Spinosa diris vere, ekridetis mi,
mi devas en tiu ĉi nokto morti, akomp-
ananta je tiu ĉi ploro: Malĝoje, tamen!»

Mi bruligis la alumeton. Furiosa
blovego de vento trakuris tra la teg-
mento de la domo.

x) Kristnasko t.e. tago de nasko de Jesus Kristo
— la granda rusa festo. xx) Arbato estas no-
mo de unu el malproksimaj stratoj de Moskvo.

Mallaŭta ploro transformiĝis en terura
bruado. Je malsupre ekfrapis rom-
pita fenestra vitro, io malĝoje ĝemegis
pro helpo.

«Estas malbone en tiu ĉi nokto
al la malfeliĉuloj» mi pensis.

Sed nun ne estis oportuna tempo
aldonis sin al tiuj ĉi ponsoj.

Kiam sur mia alumeto, kiel blua
faireto ekbruliĝis la sulfuro kaj mi
pririgardis mian ĉambron, al mi
presentiĝis la vidaĵo neatendebla
kaj terura..... Mi plendas ke la
blovego de vento ne atingis en tiu ĉi
minuto mian alumeton, tiam, oni pov-
as esti, mi nenion vidus kaj miaj
haroj ne sin levus de teruro.

Mi ekkriis, faris unu paŝon al
pordo kaj plena de teruro, de males-
pero, de mirego, mi fermis la okul-
ojn..... Sur la mezo de la ĉam-
bro staris la ĉerko. La blua
faireto brulis ne longe, sed mi pov-
is klare distingi konturojn de la ĉer-
ko.

Mi vidis ruĝetan, brilant-
an per fajreroj, ŝtofon mi vidis oran
kruceton sur la ĝia tegmenteto.

Estas objektoj, sinjoroj, kiuj sigel-
iĝas en via memoro malgraŭ se vi
vidis ĝin nur unu momenton.

Tiel same ĉi tiu ĉerko. Mi
vidis ĝin nur, unu sekundon, sed
mi memoras ĝin en ĉiuj plej mal-

grandaj detaloj. Tio ĉi estis la ĉerko por ia homo mezegranda, kaj laŭ ruĝeta koloro — por juna flaŭlino. Multekosta ŝtofo, bron-
zaj piedetoj — Ĉio tio ĉi montris ke mortinta estis riĉa. Mi rapidege elkuris el mia ĉambro kaj nenion pensante, sed nur sentante nekredeblan teruron, mi ekflugis malspren laŭ ŝtuparo. En koridoro kaj sur ŝtuparo estis mallume, miaj piedoj konfuzis sin en la randoj de la peltito, kaj estis tre mireble, kiel mi ne falis kaj ne rompis mian kolon.

Elkurinte sur la straton mi staris apud malseka telegrafkolono kaj komencis sin trankviligi. Mia koro forte frapadis..... la spiro haltadis.....

(Daŭrigota)

Kroniko.

En Formosa (insulo) komenciĝis vigla movado de nia sankta afero dank' al S-ro Ŝiro Kodama, fervora esperantisto, kiu estis transloĝinta tien post sia ellernado de nia kara lingvo en Tokio. Li unue eldonis propagandan broŝuron nomatan « Esperanta Libreto » kaj dissendis ĝin senpage.

* Legu — dank' al penega klopodo de S-ro

La rezultato estis tre kontentiga.

Sesdek personoj lin petis, ke li sendu al ili lian « Libreton ». Do li malfermis la unuan kurson ĉe Riuzangî Templo, en Taihoku, urbo, en kiu li loĝas. La kurson ĉeestis dekkvar personoj, el kiuj estas ok formosanoj (ĥinoj).

Li intencas ankaŭ komenci ĉe Kōbō-ĝi-Templo la duan kurson, kiun jam permesis ĉeesti pli ol dek personoj.

Ni esperas tutkore, ke tiel nomata Verda Insulo baldaŭ fariĝu la lando de verduloj!

Tokio Esperantista Societo nuntempe kunsidas vespere ĉiun ĵaŭdon en salono de Tokio Bucurigakko (Sciencia Lernejo), Uŝigome.

Jokoska Esperantista Societo kunsidas ĉiun vendredon ĉe sia oficejo. S-ro Ossaka, gvidanta de l'societo, veturas al Jokosuka el Tokio ĉiun vendredon por gvidi la kunsidon, ĉar li estas studento ĉe Tokia Imperia Universitato kaj loĝas plejparton de la jaro en Tokio.

« Japana Esperantisto » organo de J. E. A., reaperos en la fino de tiu ĉi jaro.

Prof. G. Makise, ĉefprofesoro de

Centra Kadeta Lernejo, kiu ĉeestis la
Okon Universaran Kongreson revenis
al Japanujo.

Korespondo.

200 Santung Road
Sanghai, 22-9-1913.

Kara Sinjoro!

Kaŭze de la ribela milito, kiu igis
min forlasi la asocion, perdi ĉion krom
libraro kaj forkuri mi ne povis pli frue
respondi vin.

Kun tiu ĉi letero mi sciigas al vi du
nekrologiojn: je la «Hina Socialisto»
jam estas malpermesita mortigita de la
registoj la redaktoroj, jam forkuris.

2^e Sekvanta al la H. S. oni ĉe Kon-
ton eldonis ankaŭ unu semajnan revu-
on «La Voĉo de l' popolo» 嗚呼録.
doniaĝe nur elpresigis 2-3 numeroj.
Tuj poste la registoj fermis kaj eĉ
arestis la redaktoron. Ĉu ekzekutis
aŭ ne mi ne scias.

Nia asocio ankaŭ en danĝera
ŝtato, tial ni migris ĝin sub la reg-
ado de fremduloj.

Ni daŭros laboron kaj interŝanĝad-
on per koresponda kurso.

La mankantaj numeroj de H. S.
al vi estos sendataj de mi, ĉar mi
posedas ĝin eble. Sed nun mi

nur havas paperan monteton, en kiu
estas libroj skribitaj kaj dokumentoj,
kiuj estis de prenataj el la oficejo post
kiam oni rabis ĝin kaj forlasis la pap-
eraĵon.

Kiam mi reordigis mian bibliotek-
eton mi sendos al vi la numerojn.

Altestime via
K. Ĉ. Ŝan.

ANONCO.

La anonco en tiu ĉi fakto kostas por paĝo
1.00 sm., 1/2 paĝo aŭ 9 linioj 0.60 sm.

Kiam la anonco estas presita, mi sendas
al la anoncanto la numeron.

GRAVA AVIZO

Nia gazeto, pro la propagando de
ideoj de anarĥismo, estis malpermesita de
hina registaro, kaj la redaktoro eldoni-
sto persekutita. Tial ni devigas esti
transloĝintaj en Macaun por la reaperio.

Kvankam ne sufiĉe fortaj ni estas,
ni certas, per nelacigebla energio, an-
taŭenpaŝi ĉiam.

La ekzempleroj de tria numero
de nia gazeto, jam persitaj sed ne an-
korau senditaj, estis tute difektitaj
de la malbonuloj. Ni okupas nin nun
je la repreparado; sed, pro la subita
transloĝigo de la presejo, okazigis gr-

andega malprofito, eble, la reapero de nia gazeto estus post unu monato. Ni petegas niajn legantojn ke, ili bonvolu pardoni la prokrastadon.

LA VOĈO DE LA POPOLO.

Novadreso: Sifo, 41. Rua da Praia Grande, MACAU, Hinujo.

Esperanta Revuo,
pri komerco, industrio, k. t. p.

La celo de tiu ĉi revuo estas: komercigi per Esperanto, kaj, principe, provi ke Esperanto povas kaj devas uzi por la plej grandeco de la komercistoj.

La jara abono kostas 2 sm.

En ĉiu urbo, oni petas korespondojn (gravaj profitoj) pri sciigoj, sin turni al Sre Ch. Tessez. 7. Bd

Rochecouart, parizo-France.

Marnovaj Orientaj Originalaj bildlibroj,

kiuj neniam reaperos en la mondo,

nun estas vendataj el ni, je jenaj malaltaj prezoj — Ili estas presitaj tute el la lignogravuraĵoj. La bildoj estas absolute laŭ la orienta stilo.

Sed ĉar ili estas jam maloftoj eĉ en Oriento, ni ne povas definitive nomi la librojn, ni nur



je jenaj prezoj ilin vendos —

A (1 volumo) 10 sd., B (") 20 sd., C 30 sd., D 40 sd., E 50 sd., F 60 sd., G 70 sd.

Mendanto sin turnu al Red de O. A. vendejo de malnovaj libroj Ni-judo.

Fako de Korespondo.

交換廣告

(1) 15-ro Gustav Richter, Meissen sur Elbe, Hafenstr. 36. (Germanujo) — interŝanĝas belajn p.k. koloritajn. 獨人

(2) 5-ro M. Plamenevskij, instruisto Rybinsk, Krestovaja, 104. (Ruslando) — dez. korespondi kun needropaj pri geografiaj temoj kaj inteŝ: B. P. kun pejzaĝoj, homaj tipoj kaj aliaj karakteraj objektoj.

(3) 5-ro Ismael Gomes Braga, Teixeiras Meinas (Brazilio-suda Ameriko) — dez.

- korespondi per ilus. p.k. kaj intersanĝi p.m. Akurate al ĉiuj respondas.
- (4) s-ro Leander Tell, G:a Rådstrugatan 44, Norrköping (Svedujo) deziras korespondi kun lingvo-interesaj kaj literaturamantaj junaj jap, Ĥin, Siamoj kaj birmoj. スウェーデン人
- (5) s-ro Polikarpo Vilarmán, strato Mar 28. Reus (Hispanujo) -dez. intersanĝi p.m. kaj p.k. Ĉiam tuj respondas.
- (6) s-ro A. Norkin, membroj de "Slucka Esperantistaro" Sluck, Minsk, gub (Rusujo) deziras korespondadi kaj intersanĝi kun ĉiulandaj geesperantistoj per l.p.l. p.m. kaj gazetoj naciaj kaj esperantaj.
- (7) s-ino Horata K., 415 Kamiosaki, Ebaragun, Tokio (Japanujo) -dez. intersanĝi p.m. antikvajn « nemunusas » po 30 aŝ 50. Ĉiam tuj respondas.
- (8) s-ro Franz Röhrig, strato Schloss 6 III Frankfurta Majn, Westlando (Germanujo) -dezi. korespondadi kun japanoj samideanoj.
- (9) s-ro Ant Slabý, Kralupy, vno, Bohemujo, (Aŭstrio) 412.1.11.1人
- (10) s-ro C. E. Pope, 7012 S. May St. Chicago, Ill. (U. S. A.) 米人
- (11) s-ro Batory Gabor, Kiskunhalas, (Hungrie = Hungarlando) 洪哥利, 以上 p.k. 交換
- (12) s-ro H. Kamogawa, "postoficisto" 61. Kamiosaki, Ebaragun, Tokio (Japanujo) -dez. intersanĝi ilus. p.k. Ĉiam tuj respondas.

- s-ro T. Ogaŭa, 473. Kamiosaki, Ebaragun, Tokio (Japanujo) -dez. intersanĝi p.m.
- (14) s-ro H. Schwandt, Lehe, Bremerhaven, Meidesl (Germanujo) 獨逸國人
- (15) s-ro Oskar Süßmann, Wien J., Franz Josefskai no 43. (Aŭstrio) 奧. 人
- (16) s-ro Zorka Zupić, Zagreb, Jlica 49 / I Krojatujo (Aŭstrujo) 奧. 1077 必
右何れも日支人と繪葉書交換を望む
- (17) s-ro S. Nišijura, ĉe "Na-ōšicī 1774" Oumomači, Isikauagun, Isikauaken (Japanujo) -dez. intersanĝi ilus. p.m.
- (18) s-ro K. Taki-jama, 12. Kobinataĉo, Kojši. Kaŭa. Tokio (Japanujo) -dez. intersanĝi p.m. kun Afrikanoj, Ĥinoj, Hindanoj kaj
- (19) F-ino Máňa Moudrá, instruitino, Praha II 522 Ječná ul. 36. Bohemujo, (Aŭstrio) -intersanĝas il. p.k. kaj ĉiam respondas.
- (20) F-ino Julie Šupichová, instruitino, Praha II, 522 Ječná ul. 36 Bohemujo (Aŭstrio) -intersanĝi il. p.k., kaj gazetojn, tuj respondas.

BIBLIOGRAFIO

Orienta Azio recenzas kun japana lingvo la verkojn, kiuj estas senditaj du ekzemplare.

Historio kaj

teorio do Ido.

本書ハ《La Ondo de Esperanto》の編輯主任 B. Kotzin 氏がエト語の歴史と理論とを述べたもの。言葉語ハ一時世間から退けられて更に顧みらるものなき有様なりしに近來之を提唱するものや多く終に此等の著を見るに至ルハ幸れ不幸れ。發行所ハ Moskvo, Lubjanskij, Projezd, 3, Librejo Esperanto. 價六十錢郵税二錢本院取次販賣す

PATRECO

KVARAKTA SOCIA DRAMO

此のドラマは四幕廿六場よりなりて劇中の人物十有五人。時計屋もあれば製作人もあり。其等ハ娘息子及び許嫁など。いろいろ人物の面白きセリフは紙上ハ横溢して。會話のケツには多大の趣味と実益とを与ふべきハ敢て葉を要せず。發行所ハ Paris, 79. Boulevard, Saint-Germain, «Hachette & Co. 價60錢送料二錢本院取次販賣す。

La Kamena Angulo

FAMILIA DRAMO EN DU AKTOJ

時ハ1861年二月の廿一日。英京龍動の有名なる劇場 Royal Olympic に於て The Chimney

てハ外題として頒ぜられた本ドラマニ幕の全篇を本書の價35錢送料貳錢にて咄がら熟觀せらるゝハ亦大ならずや發行所ハ Paris, 33. Rue Lacépède, Presa Esperantista Societo, 本院取次販賣します。

Deklaracio pri Homaranismo

DE

D-ro. L. L. Zamenhof.

題著の奇なる驚き給ふ博士ハ本書の冒頭に。Mi estas Homaro; tio signifas, ke mi gvidas min en la vivo per la sekvantaj principoj: 云々と説起して全篇十章。悉く金主の文字發行所ハ Hispanlando, Madrid. 8. (Homaro) 印刷所 (價不明)

GVIDFOLIO TRA

Letchwerth (Ĝarden-urbo)


案内書ハ敢て旅行者ばかりの讀物でない。一讀其地に遊ぶの思あらしむハ即案内書の善なるもの。本書亦其一なり。發行所ハ英圖 Herts, Letchworth, Presejo Anon.

3NFORMA3ULTENO

Organo de la Esperanta fako, starigita en la Ĝenerala Koresponda Klubo Aperas Laŭbezono, senpaga la Anoj. 發行所 Béla Dávid universitato kolozsvár, Hun-

garujo. 本誌ハ題言ヲ如キモ意ノ下ニ産出セラル。またエス語雜誌ニハ石版刷。騰写版刷等。随分多々なる中に此の Bulteno 程見夏に出来た石版刷ハ空前である四五の挿画も亦甚によし。記事も此等のもつに添ふて讀むべきもの。同志ハ須く入會して可なり

Silkaj Nazotukoj!



Tre belaj "habtaj" nazotukoj estas vendataj el Morita silkajvendejo. Ili havas diversajn kolorigitajn belegajn bildojn, kaj taŭgas sinjorojn*, fraŭlinojn, la senbildaj sinjorojn, kaj ankaŭ tre agrablaj je tiu.

1 folio A. 45 sd., B. 50 sd., 12 folioj A. 4.30 sm., B. 4.90 sm.

Pli granda kaj belega, 1 folio 70 sd., 12 folioj 7.00 sm.

Mendantoj sin turnu al la Redak.
Harada Jubi ĉe Sekaigo-Soin.

Morita ko.

Silkstoj

plej belegaj, plej malkaraj silkstoj estas vendataj ĉe silkvendistino Janada Kame. Sed ĉar ŝi ankoraŭ ne lernas Esperanton, mendantoj skribu al la Red.

de «Orienta Azio» li ĉiam tuj faros servon al vi.

Japanaj silkstoj havas du specojn, glate brila kaj mole ĉifiga. La brila estas pli bela kaj la ĉifiga pli forta.

Iliaj largecoj estas aŭ $3\frac{1}{2}$ decimetroj aŭ $6\frac{1}{2}$ decimetroj (malofte).

La prezoj estas por $3\frac{1}{2} \times 3$ decimetroj preskaŭ 3m. 0.400, 5m. 0.600, por $6\frac{1}{2} \times 3$ decimetroj 5m. 0.800, 5m. 1.500.

Kontraŭ respondkuponon oni ricevos specon de specimeno, 15x10 centimetroj, kun la prezaro.

du specoj el ili 5m. 0.160, tri specoj 5m. 0.220, kvar 5m. 0.280.



Laŭ tiu ĉi specimeno $3\frac{1}{2} \times 3$ 5m. 0.50.

本誌定價

一部十二錢。六部(半年)六十錢。十二部一圓十錢。郵税不要。半年以上購讀者、交換廣告無料。市拂込、振替番号東京一一三二五原田素軒宛に願ふ。

工入語
雜誌
いがあ
あ

第二十五號

發行兼編輯人
東京府荏原郡上大山崎四七五
原田勇美

印刷人
東京府荏原郡上大山崎四七五
原田 招

印刷及發行所
東京府荏原郡上大山崎四七五

世界語書院

大正二年一月十七日第三種郵便物認可
大正二年十一月十五日發行同月吉納本

Belaj ilustritaj leterpaperoj
Kaj kovertoj.

12 folioj da l'paperoj kun la
kovertoj estas sm. 0.360,
La 120 folioj pogrande sm.
3.000.

Mendantoj sin turnu al
la Red. de O. A.

Dekaigo-Soin.
Ebaragun, Tokio (jap.)

Tiu ĉi desegnaĵo
estas kopita el la
unu leterpapero, kiu en
Vendas. Vendisto - Nakamura.

